

Kulturaj Kajeroj

E.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 40 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1978 - 6

KULTURAJ KAJEROJ

1978 NOVEMBRO - DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Svislando P. Métivier

Voltaire, Rousseau kaj la nuntempa pedagogio F. Boyet

Legendo pri la Monto Sankta-Mikaelo G. de Maupassant trad. R. Dupuis

Sciencfikcio (fino) Vilem

La cikonio de Montpellier F. Mora trad. I. Nagy

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

La administrantoj de la Esperantista Kulturdomo deziras al la legantoj de « Kulturaj Kajeroj » feliĉon kaj sanon por la jaro 1979.

El Grésillon

Antaŭ kelkaj tagoj ni recevis leteron de Nederlando. « Kial miri », vi diros. Jen tute kutima afero ĉe esperantistoj. Ne citinda aventuro ! Sed... atendu ! Nia korespondanto skribas, ke preterpasante Baugé, li vidis ŝildojn laulonge de la vojo kun la vortoj « Centre Esperantiste » kaj tio ege scivoligis lin. « Mi supozas, ke en via urbo loĝas tiom da esperantistoj, ke la urba estraro decidis doni al la lingvo privilegian lokon ». Kio do fariĝas nia konstanta aserto al la estraro de Baugé ke « dank'al Gresillon Baugé estas konata en la tuta mondo » ? Feliĉe nia samideano sendis sian leteron al la « Unuiĝo esperantista de la urbo » ne al la urbodomo. Tiu letero abrupte forpelis niajn iluziojn. Ĉar ni kredis ke, post dudek sep jaroj, Gresillon estas nun konata de ĉiuj esperantistoj ne izolitaj.

La konkludo estas, ke ni devas daŭre klopodi por diskonigi la Esperanto-Domon Gresillon ; kaj ankaŭ, ke vi ĉiuj, niaj amikoj, kiuj ĝuis agrablajn tagojn, havis memorindajn spertojn, konatiĝis kun fidelaj amikoj en Gresillon, vi mem diskonigu nian kastelon malfermitan al ĉiuj. Ni esperas, ke nia nederlanda samideano deziros veni por konstati, ke efektive, multaj esperantistoj loĝas en Baugé... almenaŭ somere. Inter kiuj, vi mem, kompreneble, kara ieganto.

FONDUSO « FOTOKOPIILO »

Geamikoj konstatis lastan someron, ke fotokopiilo estus ege utila en Gresillon. Antaŭ kelkaj semajnoj ili proponis starigon de speciala fonduso kaj eĉ sumon de 100 dolaroj. Ni povas nur danki ilin kaj diri al la aliaj « Se vi povas, sekvu la ekzemplon ». Sendu viajn kontribuaĵojn al Esperanto-Domo Gresillon per bankĉeko aŭ al la poŝtkonto Nantes 1485-39 P. Antaŭdankojn.

Esperanto tra la Mondo

La U.E.A.-kongreso 1979

— Okaze de la universala kongreso en Lucerno, la svisa poŝto eldonos specialan poŝtmarkon (valoro : 0,70 sfr).

— Tuj post la kongreso, kies datoj estas : 28.7 — 4.8, okazos postkongreso en Interlaken (5-11 de aŭgusto).

— Okaze de la Internacia Jaro de la Infano, la kongresaj belartaj konkursoj dediĉos apartan branĉon al la porinfana literaturo.

— Post Varna, la esperantologia konferenco havos sian duan sesion en Lucerno.

— Samtempe kun la esperanto-kongreso, Lucerno gastigos ankaŭ la aranĝon « Eŭropa-Cantat » (eŭropa kantistaro) kiu unuigas kantistojn el la tuta Eŭropo. Estas antaŭvidite ke « Eŭropa Cantat » prezentos la svisan vesperon de la kongreso, kun subvencio de « Pro Helvetia » kaj de la urbo Lucerno.

— Paralele al la kongresaj eroj, la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds preparas tutan serion de diversaj sesioj. Estas notinde ke la komunumo de tiu svisa urbo konsentis vendi favorpreze al la Kultura Centro, grupon de sep domoj kun grandaj ĝardenoj, por instali libertempejon.

Adreso por ricevo de la programo : Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, 2301 La Chaux-de-Fonds, Svisujo.

La Internacia Junulara kongreso en Nederlando

Tiu junulara kongreso 1979 okazos en Austerlitz, vilaĝeto de la komunumo Zeist (Nederlando), de la 20a ĝis la 27a de julio.

Austerlitz situas en unu el la plej belaj ŝtataj arbaroj de Nederlando. Temo : « Interŝtataj unuiĝoj - kiucele ? ». Oni studos interalie la eŭropajn demandojn... krom la distraj partoj kaj ekskursoj.

La S.A.T.-kongreso 1979

La 52a S.A.T.-kongreso okazos en Svanvik (Britio), de la 13 ĝis 20 de julio 1979. La kongresejo, ĉirkaŭata de sia propra parko, situas nur 10 km de la montoĉeno Pennines. Granda sestaga Kimra rondvojaĝo estas antaŭvidita kiel antaŭkongresa ekskurso (foriro la 7-an de julio).

Informoj : O.K.K., 29, Farrance Road, Chadwell Heath, Essez RM66EB, Britio.

Perkorespondaj kursoj en Ĉekoslovakio

Pli ol 1200 personoj lasttempe enskribiĝis por partopreni la korespondajn esperanto-kursojn organizitajn en Ĉekoslovakio.

Aliaj manifestacioj en 1979

— Internacia Junulara Festivalo (internaciaj kulturaj interŝanĝoj per muziko), en Marina di Massa (Italio). Aliĝoj : Itala Esperantista Junularo, poŝtfako 210, Pisa, Italio.

— Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (4 - 11a de Aŭgusto), en Bienenberg (Svisujo).

— Kongresoj de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj de Belga Esperanto-Federacio, 27an de Aprilo - 1an de Majo, en Lille (Francujo). Adreso : S-ino M. Vilhelm, 16, rue des Aubépines, 59155 Faches Thumesnil.

— Internacia Kongreso por Katolikoj (I.K.U.E.) en Luksemburgo (7 - 14an de aŭgusto).

— Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Turku (Finnlando) de la 15a ĝis la 21-a de junio.

— Kongreso de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, en Locarno (Svisujo), 19 - 28an de julio.

— Internacia Medicina Esperanto-Konferenco, 8 - 14an de julio, en Hodmezovasarhely, Hungario. Informas : I.M.E.K. PK 89, H-6801.

Sciencaj studoj en lingvistika revuo

En 1979, aperos du numeroj de la revuo Word, organo de Internacia Lingvistika Asocio, de Novjorko, sub la gastredakto de esperantisto : Prof. D-ro Richard E. Wood, redaktoro de « Lingvaj Problemoj kaj Lingvoplanado ».

En tiuj du numeroj estos artikoloj kiuj traktos Esperanton kaj la lingva planado.

La kabareto de T.E.S.P.A.

La artistoj de la teatra trupo T.E.S.P.A. aranĝas periode esperanto-kabareton en Parizo, je la jena adreso : « Au tambour », 10, place de la Bastille.

Novaj libroj kaj diskoj

— « La filo de l'ŝtonkora homo », bildrakonto de Tibor C. Horvath, laŭ klasika romano de Jokai. Esperanto-teksto de Vilmos Benezik.

— Nova disko : « Veselin Damjanov kantas en Esperanto ». Registrado de bulgara baritono, farita de Balkanton - Sofio.

— « Tra dezerto kaj praarbaro » aventura romano de la pola verkisto Henryk Sienkiewicz (traduko de M. Sygnarski), 315 paĝoj.

— « Kain kaj Abel », kompleta kolekto de la 23 originalaj noveloj de la esperantista verkisto Sandor Szathmari, la fama aŭtoro de « Vojaĝo al Kazohinio » kaj de « Maŝinmondo ».

— « Brand », drama poemo de Henrik Ibsen, traduko de E. Haugen (kiu ankaŭ tradukis « Peer Gynt » de la sama aŭtoro). Postparolo de Kalocsay, 353 paĝoj.

— « Lingvo kaj aliaj artoj », esearo pri la originala kaj traduka esperanto-literaturo, verkita de William Auld.

— « La nova butikisto de Nukugaia », facile legeblaj kaj amuzaj noveloj de Bertram Potts, novzelandano (250 paĝoj).

— Reeldono de la traduko de Zamenhof de « la revizoro » (Gogol).

— Alia reeldono : « la knaboj de Paŭlo-strato » de Ferenc Molnar. Traduko de L. Somlai.

— « Esperanto : lingvo, movado, instruado ». Studoj kaj artikoloj de lingvistaj esperantistoj. Redaktis Detlev Blanke. 190 paĝoj. Aperis en G.D.R.

— Ni atentigas niajn legantojn pri nova eldonisto : « Vulpo-libroj », Leekerhoek 26, NL 8223 ZS Lelystad, Nederlando, kiu publikigas malmultekostajn malamplekajn literaturajojn aŭ studojn, kiel : « la kontribuo de Kalocsay al la esperanta kulturo », « Spegulo de esperantaj stiloj », « La akvariinfanoj », « Soife mortis mi » (baladoj de F. Villon).

La eldonisto sendas la liston de la publikaĵoj.

En la Freinet-movado

Freinet-edukistoj el deko da landoj partoprenas en Landerneau, de la 17a ĝis la 31a de julio, la 12an Internacian Renkontiĝon R.I.D.E.F., kie Esperanto estas unu el la debatlingvoj.

Adreso : A. Lemercier, 6, rue Beaumarchais, 29200 Brest (Francujo).

SVISLANDO

En la jaro 1979 okazos en Lucerno la universala kongreso de Esperanto. Certe, la tutmonda samideanaro direktas specialan atenton al Svislando kaj mi proponas ĉi-tie prepari antaŭe la esplorvojaĝon.

Tiu regiono de centra Eŭropo, abunde dotita de la naturo pro siaj pejzaĝaj belaĵoj, estas ankaŭ la hejmo de 4 diversaj popoloj, la teritorio de 4 lingvoj. Tiu mozaiko de popoloj kiu prezentas harmonian bildon de prospera kunvivado estas, laŭ mia opinio, studinda objekto por tiuj kiuj interesiĝas pri internaciaj problemoj.

Oni povas diri ke Svislando estas la akvorezervujo de Eŭropo. En ĝia centro, el la glaciejoj de la Gotardo Furka montaro naskiĝas riveroj kiuj malavare sendas siajn akvojn al plej foraj horizontoj de la kontinento. Montriĝas kvar geografiaj basenoj kiuj koincidas kun la kvar lingvoteritorioj troveblaj en la lando. La ĉefa rivero estas la Rejno kiu kun siaj enfluantoj Aare, Reuss kaj Limmat kolektas la duonon de la svisaj akvoj. Fariĝinte riverego, la internacia Rejno finas sian vivon en la Norda maro. Tiu regiono de la rejna baseno estas la teritorio de la germana lingvo.

Dua rivero : la Rodano iras al Mediteraneo. Kvankam ĉe la naskiĝa regiono — en la alta Valezo, estas parolata ankaŭ la germana lingvo, baldaŭ ĝi fariĝas la rivero de la franclingva teritorio. Inter la potencaj alpaj ĉenoj, Bernaj norde kaj Peninaj sude, la Rodano fluas rapide al la Lemana lago kie post ripoziga trankviliĝo ĝi direktiĝas suden al Mediteraneo.

Sude de la Gotardo-montaro naskiĝas la rivero Tiĉino kiu donas sian nomon al la itallingva kantono. Tiu rivero aliĝas al la Pô en Italio kaj tiamaniere vojaĝas al Adriatika maro.

Ni jam rapide, eĉ tro rapide, ĉu ne ? trairis la tri ĉefajn regionojn de Svislando : Rejno, Rodano, Tiĉino kie ni povas aŭdi la tri ĉefajn lingvojn : germana, franca kaj itala. Sed tie ne finiĝas nia esplorvojaĝo. Kvara vizaĝo kaŝiĝas ĉe la orienta parto. Temas pri la rivero Inn kies akvoj pere de la granda Danubo iras al la Nigra maro. Kia belega ekskurso por modestaj akvogutoj kiuj sen pasporto trairas senĝene multajn landlimojn. Tiu orienta regiono estas la kantono Grizono (Graŭbunden) kie estas parolata la kvara lingvo de Svislando : la Romanĉa, kiu estas la lingvo de 53.000 personoj kaj reprezentas nur 1 % de la tutlanda loĝantaro, sed de la jaro 1938 ĝi estas rekonata plenrajta nacia lingvo apud la aliaj. Aparte menciinda estas ke la kantono Grizono estas 3-lingva (germana, itala, romanĉa), pro tio tiu kantono estas kvazaŭ miniatura Svislando.

Mi ne sukcesas per nuraj vortoj priskribi la majestecon de la altaj montoj, la potencon de la torentoj, la bruon de la ŝaŭmantaj akvofaloj, la kvietigan spektaklon de la lagoj. Por tio bezonus bildojn aŭ pli bone oni sentas tion surloke. Sed, estu certaj, tiu abunda diverseco de pejzaĝoj donas la impreson ke Svislando estas tuta kontinento malgraŭ ke la federacia teritorio kovras nur 41.300 km2.

Ni rapide pasas de unu lingvo al alia sed ne aperas malfacileco kaj severeco. Tabuloj, dokumentoj, publikaj servoj disponigas la informojn en la aliaj lingvoj de la federacio. la agrabla etoso sentiĝas. Regas tie speciala socia vivo. Tiu regno estas aro da nacioj, da gentoj kiuj ĵuris vivi kune en amika atmosfero.

Estiĝo de la Svisa Federacio

En la feŭda epoko, la regionoj ĉirkaŭ la lago de la Kvar kantonoj, ambaŭflanke de la grava vojo al Gotardo, estis sub la regado de Aŭstro-germanaj princoj. Sed, la surlokaj administrantoj kondutis tiel tiranece ke la popolo de tiuj arbaraj montaraj regionoj finfine ribelis. En tiuj regionoj kie la laboroj postulas solidarecon, interhelpon de la arbaristoj kaj paŝtistoj, la popolo jam havis valoran sperton pri komuneca vivo. Post venka ribelo, la tri kantonoj : Schwitz, Uri kaj Unterwalden ĵuris interhelpi sin reciproke por defendi sian liberecon. Estis la unua alianca pakto subskribita, proklamita la l-an de aŭgusto de la jaro 1291. Tiu dato estas konsiderata kiel tiu de la naskiĝo de la Svisa Konfederacio kaj estas ĉiujare festata.

Baldaŭ, en la postaj jardekoj, aliĝis 5 aliaj kantonoj : Lucerno, Zug, Glarus, Bern, Zurich. Ili formis siatempe la tiel nomatan : Primitiva Svislando ĉirkaŭ la jaro 1500 aliĝis 5 aliaj kantonoj : Basel, Appenzell, Solothurn, Schaffhaŭsen, Fribourg. 5 jarcentojn daŭris la formiĝo de la tuta konfederacio ĉar nur en 1803 aliĝis 6 novaj kantonoj, nome : Tiĉino, Sankt'Gallen, Vaud, Grizono, Thurgaŭ entute 22 kantonoj. La tuto formis kvazaŭ grapolon de ŝtatoj komplete sendependaj kun sia propra aparta konstitucio. Ili estis ligitaj inter si nur per tiu alianca pakto kiu garantias reciprokan interhelpon. Tia estis la situacio en la unua duono de la 19-a jarcento. Sed baldaŭ montriĝis ke la kompleta suvereneco de tiuj malgrandaj kantonoj estas obstaklo por la plenumiĝo de la trafika-industria evoluo. Ĉiu kantono havis sian propran monon, sian doganon, ĉiujn kutimajn bremsilojn kiuj akompanas la nocion de suvereneco kaj landlimo. En tiu situacio, kiel konstrui fervojon se meze de la lando iu kantono ne permesas ?



Post multaj diskutadoj, en 1848, per konstitucio, la 22 kantonoj unuiĝis pli intime en federacia ŝtato kaj la urbo Berno estis elektata kiel federala ĉefurbo. Estis konstruata tre bela palaco por ŝirmi la parlamenton. Tiu konstitucio de la jaro 1848 ankoraŭ regas la modernan Svislandon.

La personeco de la kantonoj, ankaŭ nomataj ŝtatoj aŭ respublikoj, estas garantiata per asembleo kiu estas la Konsilio de la ŝtatoj. Alia asembleo, la nacia konsilantaro reprezentas la unuopajn civitanoin. Estus tro longe raporti pri ĉiuj detaloj de la politika organizo sed interesa atingaĵo estas ke ĉe la 3 ŝtupoj : komunumo, kantono kaj federacio, la vivo disvolviĝas kiel eble plej demokrate. Ĉiuj regionoj povis konservi sian lingvon, sian religion, siajn apartajn vivmodojn kaj samtempe profiti de la ĝenerala evoluiga situacio kiun ebligas aparteno al vasta komunaĵo.

Pierre METIVIER.


Voltaire (Volter'), Rousseau (Ruso) kaj la nuntempa pedagogio

Laŭ prelego prezentita en Grezijono dum Julio 1978.

La nuna jaro, 1978, estas ducentjara datreveno de la morto de tiuj du famaj verkistoj, kaj, tiuokaze, oni ofte elvokas iliajn tiamajn disputojn kaj ankaŭ la influon, kiun ili ankoraŭ havas en niaj juĝoj. Miaflanke, mi zorgos nur pri tio, kio nun povas influi en la nuntempa pedagogio.

Tamen, mi skeme memorigos la temojn pri kiuj ili disputis en siaj vivoj. Jam, en 1750, Ruso' asertis ke : « la sciencoj kaj artoj » koruptas la morojn, li kontraŭstaris siajn tiamajn amikojn, sed kiam li verkis, kvin jarojn poste, disertacion pri la deveno de socia neegaleco, tiam li provokis reagon de Volter', ĉampiono de la bona efiko de la civilizacio. Skeme, por resumi la konflikton inter Ruso' kaj la « filozofoj de la lumoj », oni povas diri, ke, unuj kaj aliaj (kaj nome Volter' kaj Ruso') kondamnis la tiaman socion ; sed dum Volter' kondamnis la stultecon, la superstiĉon kaj la fanatikecon kaj fidis pri kulturo, kiu forpelos tiujn erarojn, kiuj fontas el malklereco, Ruso' kondamnis precize tian kulturon, fidante nur pri la fundamenta bono de la naturo.

La Voltera influo manifestiĝis precipe, kiam oni dekretis pri deviga lernado ; tiam, tiu lernado aspektis liberiga, ĝuste ĉar ĝi alportis, dank'al la majstreco de la skriba lingvo la kuracilon kontraŭ la stultaĵoj, superstiĉoj, kaj fanatikismoj. La popolon oni juĝis liberigata per partopreno en la komuna kulturo. Nun, oni ankoraŭ rifuzas la estantajn aŭtoritatojn, sed oni ne plu kredas, ke la dissendo de konoj sufiĉos por liberigi la homojn. Tamen restas, en la leĝaro de multaj landoj, decidoj pri deviga instruo, kaj eĉ multaj agas favore al plilongigo de tiu deviga instruo. Sed al tiu postulo pri grand-kvanta instruo aldoniĝas alia prikvalita, kiam oni petas, ke jam en la infanaĝo, oni instruu la plej modernajn matematikon kaj lingvistikon. Mi opinias Voltera tiun frazon, kiun mi legis en libro pri moderna matematiko : « Dank'al frua instruado de la moderna matematiko, ĉiuj infanoj de la popolo povos eniri la Universitaton ». Postuli por ĉiuj la universitaton, ĉu ne estas fidi pri socia kulturo ?




La influo de Ruso' estas evidente multe pli grava. Al Ruso' ni ŝuldas la zorgon feliĉigi la infanon donante al ĝi liberon. Ankaŭ de Ruso' venas la ideo pri re-eltrovo de la sciencoj, ne el la libroj, sed per propra eksperimenta serĉo en la naturo. Oni denove povas referenci al Ruso', kiam oni aprobas, ke infano neglektas la legadon kaj rifuzas la fruajn trejnadojn pri vortoj en lingvo aŭ pri nombroj en kalkuloj. Sed, se ĝi pruntis multe al Ruso', la nuntempa pedagogio kondamnas multajn principojn de la Ĝeneva filozofo. Oni povas citi tiun leteron al D'Alembert (Dalember'), kie Ruso' kulpigas la teatron, sed proponas militistajn paradojn por la junaj viroj, kaj balojn por la geedziĝontoj. Tiu koncepto, tute Sparta, de la servo al la civito estis tiel kompromitita de la lastatempaj diktatoraj reĝimoj, ke estas malmute da adeptoj en la pedagogiaj medioj. Same, oni kondamnas la manipuladon, kiun Ruso' proponas en « Emilo » : « Ke via edukato kredu ĉiam esti mastro, kaj vi mem estu tio. Ne ekzistas servutigo tiel perfekta kiel tiu, kiu konservas la ŝajnon de libereco ; oni tiel kaptas eĉ la volon. » Al la guvernisto, ĉefpontifiko de la Naturo, oni substituis, sub la influo de Rogers (Roĝers') la sendirektivan teorion, laŭ kiu la edukanto, imitante la psikanaliston, stompas sin por agi kiel spegulo, kie la edukato konsciiĝas pri si mem. La aliaj diferencoj kun Ruso' venas de la evoluo de la socio kaj de la praktikaj neprecoj. Oni ne plu lasas la infanojn al la « naturaj » edukantoj, tio estas la gepatroj, sed oni konfidas ilin al sociaj organismoj : infanvartejoj kaj juninfanaj lernejoj, kie dejoras homoj, kiujn Ruso' nomus : « kanajlaro de servistoj », kaj en urboj, kie, laŭ Ruso', la moroj estas « nigraj ». Aliflanke, dum Ruso' agnoskas la naturajn neegalecojn inter la homoj, la nuntempa pedagogio, laŭ la principo de « egaleco de la ŝancoj », strebas por konduki iujn lernantojn je la sama ritmo en la intelekta edukado. Kompreneble, je la nomo de la aŭtoro de « la sociala kontrakto », kiu anoncis la popolan suverenecon, oni povas provigi la voĉdonojn en la klasoj. Sed la infano, kiu estas en la malplimulto, ne havas la privilegion de Emilo, li ne kliniĝas antaŭ la Naturo, eĉ ne antaŭ la sperto de plenkreskulo, sed antaŭ intrigo, kiu memorigas tiujn, kiuj kondukis la verkiston al senĉesa fuĝo, ĝis la lastaj « promenadoj » de iu solulo.

Siatempe, Volter' kaj Ruso' malsukcesis. Volter', kiu revis pri klera despotismo, estis forpelita de Prusujo far Frederiko la dua, kaj se, en Ferney (Ferne'), li mem povis vivi kiel klera despoto, li ŝuldis tiun situacion nur al privilegio de la riĉeco. La sinteno de Kandid', kiu kultivas sian ĝardenon, estas socia malsukceso, ĉar la individuo izoliĝas... kaj plie, oni devas posedi ĝardenon, tio estas propran vivrimedon, kie oni havas la eblon fari kion oni deziras sur peceto de la terglobo. Koncerne Ruso', la fino de lia vivo montras, kiel li estis forjetita de la samtempuloj, kaj pluvivis nur dank'al protektantoj.

Du jarcentojn poste, ĉu oni povas esperi, ke tiuj verkistoj postlasis konsilojn uzeblajn nun ? Kompreneble, oni povus pensi tuj pri politikaj flankoj, sed tio ne estas

mia temo, mi parolos nur pri pedagogio. Laŭ la vidpunkto de la prieduka filozofio, oni devas agnoski, ke la principoj prezentitaj de tiuj du verkistoj restas utopioj. Ĝis nun, oni neniam pruvis, ke la rafinita civilizacio proponita de Volter', aŭ la naturo deigita de Ruso' sufiĉis por eduki homojn indajn je la humanismo de tiuj du aŭtoroj. Oni vidis multajn fanatikismojn prezentitajn kiel « sciencajn teoriojn », kaj la « natura edukado » tute ne pruvis sian valoron. Sed, anstataŭ diskuti pri la principoj, mi preferas rigardi pli detale, je la nivelo de la ĉiutaga praktiko, la malfacilaĵojn en kiuj baraktas la nuntempa pedagogio, kaj en kiuj, miaflanke, mi distingas antinomiojn, kiuj, laŭ mi, kondukas al necesa fiasko la provojn enkondukitajn en tiuj lastaj dudek jaroj.

La unua antinomio estas la samtempa postulo pri diplomoj kaj rifuzo de programoj. Dum la burĝa periodo de la universitato, estis malmultaj studentoj, kaj inter ili, sufiĉe ofte, heredantoj ne bezonis helpon de la universitato por trovi vivrimedojn ; tial oni povis kredi, ke nura sukcesa partopreno en universitataj studoj liveras socian situacion. De tiu supraĵa kredo, la popolo kaj ĝiaj reprezentantoj postulis la eblecon por ĉiuj eniri universitaton, kaj antaŭ kelkaj monatoj duono de la Francoj voĉdonis por programo, kiu inkludis devigan instruadon ĝis la aĝo 18-jara... tio estas ĝis la pordo de universitato. Sed kio okazas fakte en tiu, pli malpli deviga instruado, en la tiel nomataj « sekundaraj studoj » ? La lernantoj pli kaj pli multas, sed en tiu amaso, ankaŭ multaj estas la junuloj, kiuj ne kapablas sekvi la progresadon. De tiu lasta fakto, oni povas konkludi : ĉu, ke iuj lernantoj ne povas intelekte instruiĝi, kaj oni liberigas ilin de la deviga instrusistemo, ĉu, oni rifuzas vidi tiujn perditajn lernantojn, kaj oni malaperigas ĉion, kio permesas konscii pri tiuj diferencoj : uzon de precizaj notoj, klasadon de la lernantoj, kaj, kompreneble, ekzamenojn, kiujn anstataŭas rigardoj al dosiero. En tiaj kondiĉoj, la nombro de la diplomitoj grave plimultiĝas, sed ĉar al tiaj diplomoj ne respondas firma garantio pri kompetenteco, la diplomoj senvaloriĝas al nuraj paperaĉoj. Ŝajne, la popolo gajnis, ĉar estas multaj diplomitoj, sed tiu venko estas nur ŝajna, ĉar la nombro de la diplomoj multe superas tiun de la faktaj postenoj en la socio ; la diplomo, kiu jam estis intelekte senvalora, estas plie socia senefikaĵo. Socie oni gajnis nenion, sed racie oni multe perdis per konfuzigo de la situacio, uzo de sensignifaj vortoj, ne paroli pri la morala defalo, kiu kredigas, ke iu ajn povas fari ion ajn sen preparlaboro, sen peno nek strebo. Ruso' pri tia dekadenco, kulpigis la kulturon (li tiam diris : « sciencoj kaj artoj ») kaj dezıris plialtigi la moralan nivelon per militistaj paradoj. Persone, mi ne kulpigos kulturon, ĉar ĝuste tiu defalo akompanas similan intelektan malstreĉiĝon ; la vera kaŭzo estas aliloke, ni vidos tion poste.



Alia antinomio aperas inter du aspektoj de la nuntempa pedagogio : unuflanke oni rekomendas individuigitan laboron, per slipoj, kiu permesus al ĉiu, labori laŭ sia propra ritmo, aliflanke, oni postulas, ke ĉiuj infanoj aŭ junuloj samaĝaj estu en sama klaso. Teorie, se oni efektive individuigus la instruon, la postulo pri ĉiujara progresado ne estus danĝera. La mallerta lernanto, kiu laborus en la tria klaso per slipoj de la unua, povus efektive sidiĝi en la sama ĉambro kiel la lernantoj samaĝaj, kiuj laborus per aliaj slipoj. Sed en la realeco, tiu individuigita laboro estas limigita en la tempo, kaj dum pluraj horoj, la lernantoj de diversaj niveloj okupiĝas pri komunaj taskoj. Kio okazas tiam ? Oni proponas la tiel nomatan « laboron en skipo » (aŭ en teamo se oni estas sportamanto), la plej lertaj kondukas la laboron, la aliaj rigardas kaj helpas en materiaj flankaj kromlaboreroj kaj fine oni diras, ke : « ĉiu skipano faris la laboron kaj meritas laŭdojn ». Antaŭ nelonge, mi vidis instruistinon, kiu solvis problemon « kun siaj lernantoj ». Fakte, la lernantoj rigardis la instruistinon trovi la solvon, sed poste ŝi klarigis al mi : « tio kuraĝigas miajn lernantojn, ĉar ili kredas, ke ili sciipovas solvi la problemon ». Oni nepre pensas pri Ruso' kaj al la ŝajna libero donita al Emilo, oni retrovas la saman mistifikon. En tiu situacio du kazoj eblas, ĉu la lernantoj ne kredas, kaj ili venas en klason devige, por enui rigardante la aliajn labori, ĉu ili kredas la trompon, kiel ili kredas pri la senvaloraj diplomoj disdonitaj, kaj kiam ili konsciiĝos pri la mistifiko, tiam oni devos timi, ĉu la ribelon, cu ilian malesperon eventuale ambaŭ.

Tria antinomio aperas inter la intenco perfektigi la laboron de la lernantoj, kaj la deziro larĝe malfermi la lernejojn al ĉiuj infanoj. Antaŭe, kiam oni akceptis en liceoj kaj kolegioj nur la plej lertajn lernantojn, la laboro proponita, ekzemple, en biologio, konsistis el lernado en la libroj, sufiĉis por tio scipovi legi, kaj observado de anatomiaj pecoj. Por sukcesi, sufiĉis bone rigardi, bone desegni, kaj ĉefe, bone memori ; tamen, eĉ tiaj laboroj ne estis eblaj por la elektitaj lernantoj. Nun, oni akceptas ĉiujn infanojn de la lando, lertajn aŭ mallertajn, kaj oni postulas de ili eksperimentan malkovron de la biologio, laŭ la principo de Ruso'. Sed en la nunaj klasoj, kie la lernantoj (11-12-jaraj) plejparte ne kapablas kalkuli dividon, oni ekiras en demonstrojn, oni mezuras (eĉ per verniero), oni kalkulas mezajn nombrojn, oni statistikas, desegnas grafikaĵojn kaj atingas konkludojn... kiuj horigas la fakulojn, tiel ili estas grave eraraj. Kiel en la salonoj kie vivis Volter' estis laŭmode eksperimenti, tiel en la instruaj medioj estas laŭmode serĉi, ĉiam, ĉie, pri ĉio. La ĉefuloj rekomendas la sisteman sindemandon, oni rifuzas ĉiujn konojn por mem serĉi, oni parolas nur pri « serĉvojetoj », kaj tiu kontaĝa malsano transiras de la instruistoj al la lernantoj, kiuj, siavice, serĉas en multekostaj laboratorioj. (En multaj kolegioj, je 200 km de la maro, estas « maraj akvarioj » por la studo de la « loka» medio !). Tiuj serĉistoj estas infanoj, kiuj ne kapablas esprimi la konkludojn de siaj eksperimentoj, ĉar ili kapablas nek skribi nek paroli iun ajn lingvon.

Fine mi mencios alian mistifikon : la metamorfozoj de la instruo per instruistoj kaj lernolibroj. Eble laŭ la spuraro de Ruso', oni sincere opiniis, ke lernantoj nenion devas lerni de lernolibroj kaj de instruistoj, sed ĉion retrovi per sia propra serĉo. Sed, ĉar ne estas alia programo ol tio, kion la lernantoj proponas, ĉar la lernantoj ne povas distingi la temojn atingeblajn disde tiuj, kiujn ili ne kapablas kompreni... tio kondukas al studoj, kie la lernantoj solaj povas trovi nur monstrajn konkludojn. Por eviti tion, oni uzas, tiam, geniajn eltrovaĵojn nomatajn : « skipa laboro » kaj « dokumentaro ».

La lernantoj ne plu ricevas lernolibrojn faritajn por ili, sed verkojn destinitajn al larĝa publiko, kaj kies nivelo, ĉu teknika ĉu lingva, ne kongruas kun la kapabloj de la lernantoj. Post ricevo de la dokumentaro, la skipo eklaboras, oni kopias frazojn detranĉitajn, pli malpli hazarde, de la ĉirkaŭteksto, oni sinsekvigas tiujn frazojn unuj la aliajn, kaj, je fiksita dato, iu raportanto legas iun prelegon antaŭ siaj samklasanoj. Kiam oni estas riĉa, oni ciklostiligas la tekston, kiu estas disdonita... kaj nature fariĝas nova dokumento. Antaŭe, lernolibro estis verkita de fakulo (oni rajtas opinii, ke iuj tiaj aŭtoroj estis pedagogoj) cele al la lernantoj, kaj la komentarion faris instruisto speciale preparita por tiu profesio : alparoli la lernantojn kaj paroligi ilin. Nun, la lernantoj daŭre ricevas pasive komentarion, sed ĝi venas de balbutanta lernanto, kiu, pli malpli vane, provas esprimi tekston, kiun li ne bone komprenis. Kompreneble, sagaca instruisto povas eviti tiujn eventaĉojn, kiuj fontas el la pura teorio ; sufiĉas, ke li laboros kun la lernantoj (tio estas klarigi al la skipo, kiel, antaŭe, li klarigis al la tuta klaso), ke li korektos la tekston de la skipo (tio estas substitui sian esprimon al la nekomprenebla verkaĉo de la lernantoj). Tiel, oni fine atingos bonan tradician instruon, zorge, sed hipokrite (pensu pri Ruso') prezentitan kvazaŭ ĝi estus « lernanta laboro ». Ĉu eblas kredi, ke, tiel trompi la lernantojn, akordiĝas kun la celo : eduki estontajn civitanojn ?

Siatempe, Volter' kaj Ruso' malsukcesis ; tio, kion oni nomas moderna pedagogio estas fiaskanta, sed la fiasko estas zorge kaŝita. Kial estas tiuj malsukcesoj, kial oni provas lerte mistifiki ? Laŭ mi, tiuj teorioj malsukcesas, ĉar ili ne baziĝas sur realeco. La scienca kono, la arta kulturo, alivorte la « civilizacio » kara al Volter', ne havas moralan efikecon. Eĉ klera, eĉ helpata de « Racio », despoto ne estas necese justa ; kaj la popolo, eĉ posedanta konon de la skriba lingvo restas sklavo de la pasioj kaj raciigitaj fanatikismoj. La naturo ne estas bona, la bestoj vivas per mortigo unuj de la aliaj, kaj kiam estas detruitaj la aliaj specioj, homo konkurencas homon, kaj laŭ la naturo, homo por postvivi devas mortigi la aliajn homojn. Cetere, natura homo ne ekzistas, ekde la infanaĝo, ĝi ricevas influon de la socio, kaj nur utopie oni povus meti ĉiun homon sub influo de guvernisto. La infanoj, kiuj vivas inter si, en bandoj, neniam montras « naturan » bonecon. La teorio de Ruso' estas, miaopinie, tute falsa. Sed la modernaj teorioj ankaŭ tiaj estas. Neniam oni pruvis, ke ĉiuj infanoj naskiĝis kun samaj kapabloj, kaj ĉio, kio provas uniformigi la lernan progresadon disrompiĝas kontraŭ la rifon de realo. La libero trudita al infanoj kontraŭas la spontan emon al imitado. Meti infanon en medion, kie ĝi ne trovas modelon, estas liveri ĝin al angoro aŭ al imito de la aliaj ; sed ĉu oni estas pli libera imitante najbaran infanon prefere al patro aŭ al instruisto ? Kial lasi la respondecon de la programoj al la lernantoj, kiuj, pro manko de sperto, povas elekti nur blinde, kaj iras de iu fiasko al alia.

Koncerne la mistifikojn, kiujn mi plurfoje citis, necesas precipe kredigi ĝusta la falsan teorion, ĉar oni ne kuraĝas diri, ke oni eraris... kaj erarigis la aliajn. Volter' maljuniĝanta decidis persone agi por justeco... la cetero, kiel dirus la stoikistoj, ne dependas de li. Ruso' provis purigi sian konsciencon per la « konfesoj », kaj lasis al aliaj la mision apliki siajn teoriojn. Estis la Teroro, ligita kun la kulto al la Plej Alta, sed ankaŭ la Honorlegio kaj la Napoleonaj liceoj, kie la lernantoj ellitiĝis je rulado de tamburoj. Oni povas sin demandi al kiu Termidoro, aŭ al kiu Waterloo iras la modernaj uzantoj de la nunaj utopioj. Mi legis iam, en serioza ĵurnalo, ke ofte, en Britio, la homoj kiuj venas de la ekskolonioj estras en fabrikoj, la denaskajn Britojn, ĉar tiuj lastaj estas nesufiĉe kleraj. La estonteco apartenos al tiuj, kiuj kapablos akcepti la laboron, la penon, la strebon, kaj fine la selekton. Ĉar en la tiel nomataj riĉaj okcidentaj landoj oni rifuzas tiujn valorojn, oni povas konjekti, ke tieaj homoj estos sklavigitaj de la aliaj, pli laboremaj, sed eble, ankaŭ pli fanatikaj ? Ĉu oni povas labori sen fanatikismo ? Tiam, la mondo havos aliajn mastrojn, sed la homaro daŭre estos sklava, krom se ĝi sukcesos sin detrui en terura milito. Ĉu ĉio estas senespera ? Ne necese, sed, laŭ mi, oni devas trovi kuraĝon aŭ naivecon de la infano en la fabelo, kiu agnoskas ke la reĝo estas nuda. La nunaj respondeculoj pri edukado en okcidento ŝajnas ne havi tiun kuraĝon aŭ klarvidon. Oni diris al ili, per belaj frazoj kaj « sciencaj » rezonadoj, ke la vestoj de la reĝo estas mirindaj, de tiam, ĉiuj rekantas la saman himnon, krom kelkaj, kiujn, konsekvence, oni taksas frenezuloj. Dum kiom da jaroj daŭros tiu mistifiko ? Certe malpli ol du jarcentoj.

KOMPARA KALENDARO

1694 — Volter' — 1778

1734	Filozofaj leteroj	(40-jara)
1744-47	Volter' ĉe franca kortego.	
1747	Zadig (virtulo sukcesas)	(53-jara)
1750-1753	Volter' ĉe prusa kortego.	
1755	Letero al Ruso'	(61-jara)
1756	Eseo pri moroj	
1759	Kandid' (virtulo izoliĝas)	
1760	Volter' instaliĝas en Ferney	(66-jara)
1762	Afero Calas	Volter'
1766	Afero La Barre	izolito luktas
1776	Afero Lally-Tollendal	por justeco

1712 — Ruso' — 1778

1740	Ruso' estas guvernisto en Liono	(28-jara)
1750	Disertacio pri efiko de sciencoj kaj artoj	(38-jara)
1755	Disertacio pri deveno de neegaleco	(43-jara)
1758	Letero al Dalember'	
1762	La sociala kontrakto Emilo	(50-jara)
1765	Konfesoj	(53 -jara)
1776	Promenadoj	(64-jara)

Noto : La libroj : Emilo kaj la sociala kontrakto estis bruligitaj, kaj la Konfesoj, same kiel la « revaĵoj de solula promenanto « aperis nur post la morto de Ruso' ».

F. BOYET.

LEGENDO PRI LA MONTO SANKTA-MIKAELO

Mi vidis ĝin unue el Cancale, tiun feinokastelon kvazaŭ plantitan en la maro. Mi vidis ĝin malprecize kiel grizan ombron starantan en la nebula ĉielo. Mi ĝin revidis el Avranches ĉe la sunsubiro. La vastega sablejo estis ruĝa, la horizonto estis ruĝa, la tuta ekstermezura golfo estis ruĝa ; nur la kruta abatejo konstruita tie malproksime de la kontinento kvazaŭ fantazia nobelkastelo, mireginda kiel songpalaco, neimageble stranga kaj bela, restis preskaŭ nigra tra la purpuraj nuancoj de l'mortanta tago.

Mi iris al ĝi jam ĉe la tagiĝo la morgaŭan tagon, marŝante nun tra la sabla ebenaĵo, streĉe rigardante tiun monstran juvelon same grandan kiel montaro, ĉizitan kiel kameo kaj vaporan kiel muslino. Ju pli mi alproksimiĝis, des pli mi sentis min transportata de admiro, ĉar nenio en la mondo eble estas pli perfekta kaj pli eksterordinara.

Kaj mi vagis surprizite, kvazaŭ mi malkovris dian loĝejon, tra tiuj ĉambregoj portataj de kolonoj jen pezaj, jen gracilaj, tra la koridoroj skulptitaj kiel puntaĵoj, kaj mi levis miajn mirigitajn okulojn al tiuj pintaj turetoj, kiuj similas raketojn direktitajn al la ĉielo kaj al tiu tuta nekredebla miksaĵo de turetoj, gargojloj, graciaj kaj ĉarmaj ornamaĵoj, ŝtona pirotekniĥaĵo, granita punto, kolosa kaj delikata majstroverko arĥitektura.



Ĉar mi restis en ekstazo, alvenis kamparano de l'Malsupra Normandio, kiu rakontis al mi la historion pri la granda kverelo de Sankta-Mikaelo kun la Diablo.

Ĉiu vilaĝo de Francujo estas metita sub la patronecon de protektanta sanktulo modifita laŭ la karaktero de la enloĝantoj.

Tiamaniere Sankta-Mikaelo gardadas la Malsupran Normandion, Sankta-Mikaelo, la radianta kaj glora anĝelo, la glavbatalanto, la ĉiela heroo, la triumfanto, la venkinto de Satano.

Sed jen kiel la sud-normando, ruza, insida, malica kaj ĉikanema, komprenas kaj rakontas la luktadon de l'granda sanktulo kontraŭ la Diablo.

Por ŝirmi sin kontraŭ la fiagoj de sia demona najbaro, Sankta-Mikaelo konstruis mem meze de la Oceano tiun loĝejon indan al ĉefanĝelo ; kaj efektive, nur tia sanktulo povis fari al si tiel grandiozan restadejon.

Sed ĉar li ankoraŭ timis ke la Maliculo alproksimiĝos, li ĉirkaŭigis sian bienon per moviĝantaj sabloj, pli perfidaj ol la maro.

La Diablo loĝis en humila pajlokovrita domo sur la marbordo ; sed li posedis la herbejojn baniĝantajn en sala akvo, la belajn grasajn terojn, kie kreskas pezaj produktoj, ĉiujn riĉajn varojn kaj fekundajn montetojn de la regiono, dum la sanktulo regadis nur sur la sablejo. Sekve de tio Satano estis riĉa kaj Sankta-Mikaelo estis same malriĉa kiel ĉifonulo.

Post kelkaj jaroj da fastado la sanktulo enuis pro tiu situacio kaj deziris fari kompromison kun la Diablo ; sed la afero ne estis facila ĉar Satano amis siajn rikoltaĵojn.

Li pripensis dum ses monatoj ; kaj iun matenon li piediris al la kontinento. La demono manĝis la supon antaŭ sia pordo, kiam li ekvidis la sanktulon ; tuj li rapidis al li renkonte, kisis la malsupron de lia maniko, igis lin eniri kaj proponis al li refreŝigan trinkaĵon.

Post kiam li trinkis tasegon da lakto, Sankta-Mikaelo ekparolis :

— Mi venis por proponi al vi aferon.

La Diablo, naiva kaj bonfida, respondis :

— Plaĉas al mi.

— Jen. Vi cedu al mi ĉiujn viajn terojn.

Satano, maltranviliĝinte, volis paroli :

— Sed...

La sanktulo daŭrigis :

— Unue aŭskultu. Vi cedu al mi ĉiujn viajn terojn. Mi prizorgos ilian bonstaton, la kamplaborojn, la plugadon, la semadon, la sterkadon, unuvorte ĉion, kaj ni dividos la rikolton en du egalajn partojn. Ĉu bone ?

La Diablo nature maldiligenta konsentis.

Li petis nur krome, kelkajn el tiuj bongustegaj trigloj, kiujn oni kaptas ĉirkaŭ la soleca monto. Sankta-Mikaelo promesis la fiŝojn.

Ili frapis reciproke en siaj manoj, kraĉis flanken por sigeli la faritan aranĝon kaj la sanktulo daŭrigis :

— Vidu, mi ne volas ke vi trovu kaŭzon por plendi pri mi. Elektu tion, kion vi preferas ; ĉu la parton de la rikoltoj, kiu estos ekster la tero, aŭ tiun, kiu restos en la tero.

Satano ekkriis :

— Mi prenos tiun, kiu estos ekster la tero.

— Interkonsentite, diris la sanktulo.

Kaj li foriris.

Sed jen, ses monatoj poste, en la grandega bieno de la Diablo oni vidis nur karotojn, napojn, bulbojn, skorzonerojn, tiajn plantojn, kies grasaj radikoj estas bonaj kaj ĝuigaj kaj kies senutila foliaro apenaŭ utilas por nutri la bestojn.

Satano ricevis nenion kaj volis rompi la kontrakton, nomante Sanktan Mikaelon « maliculo ».

Sed la sanktulo havis grandan ŝaton al la kulturado ; li refaris viziton al la Diablo.

— Mi certigas al vi ke mi tute ne pensis pri tio ; okazis hazarde ; ne estas mia kulpo. Tamen por kompensi vian malprofiton, mi proponas ke vi ricevu en tiu ĉi jaro ĉion, kio troviĝos en la tero.

— Plaĉas al mi, diris Satano.

En la sekva printempo la tuta surfaco de l'teroj apartenantaj al la Malica Spirito estis kovrata de belegaj grenspecoj, avenoj same grandaj kiel pintaj turetoj, linoj, bonegaj kolzoj, ruĝaj trifolioj, pizoj, brasikoj, artiŝokoj, kaj de ĉio alia, kio elkreskas sub la suno, kun grajnoj aŭ fruktoj.

Satano ankoraŭfoje ricevis nenion kaj tute malkontentiĝis.

Li reprenis siajn herbejojn kaj plugejojn kaj restis surda al ĉiu nova proponklopodo de sia najbaro.

Unu tuta jaro pasis. De l'supro de sia izolita nobelkastelo Sankta-Mikaelo rigardadis la malproksiman kaj fekundan teron kaj vidis la Diablon gvidi la laborojn, enporti la rikoltojn, draŝi sian grenon. Kaj li furiozegis, kolerante pro sia malpotenco. Ne povante plu trompi Satanon li decidis venĝi sin kaj li revizitis lin, petante ke li venu por tagmanĝi la postan lundon.

— Vi ne havis bonŝancon en viaj aferoj kun mi, li diris ; mi scias tion ; sed mi ne volas ke restu venĝemo inter ni, kaj mi kalkulas ke vi venos por intima tagmanĝo. Mi regalos vin per bongustaĵoj.

Sankta-Mikaelo lin eksidigis ĉe sia belega tablo. Oni prezentis unue volovanon plenan de kokaj krestoj kaj testikoj kun buletoj de kolbasaĵo kaj du grandajn triglojn kun kremo ; post tio meleagron en vino, plenan de konfititaj kaŝtanoj, poste ŝaffemuraĵon de sala herbejo, same bongustan kiel kuko ; post tio legomojn, kiuj tuj fandiĝis en la buŝo, kaj fine bonan varman platkukon, kiu fumis eligante buteran parfumon.

Oni trinkis puran cidron ŝaŭmantan kaj sukeran, kaj vinon ruĝan kaj ebriigan, kaj post ĉiu plado oni faris truon (1) per malnova pombrando.

La Diablo trinkis kaj manĝis kiel kofro, tiom kaj tiel ke li eksentis ĝenon.

Tiam Sankta-Mikaelo leviĝinte ekkriis potence kun tondra voĉo :

— Ĉu... antaŭ mi, antaŭ mi, kanajlo, vi tiel kondutas... antaŭ mi... ?

Satano terurite ekfuĝis, kaj la sanktulo kaptinte bastonon lin postsekvis.

Ili kuris tra la malaltaj haloj turniĝante ĉirkaŭ la kolonoj, supreniris la subĉielajn ŝtuparojn, galopis laŭlonge de l'kornicoj, saltis de gargojlo al gargojlo. La kompatinda demono korŝire malsana forkuris, malpurigante la loĝejon de la sanktulo. Li troviĝis fine sur la lasta teraso, tute supre, de kie oni vidas la tutan grandegan golfon kun ĝiaj paŝtejoj. Li ne plu povis eskapi ; tiam la sanktulo, donante al lia postaĵo furiozan piedfrapon, elpelis lin kiel pilkon tra la spaco.

Li glitflugis tra la ĉielo kvazaŭ lanco kaj peze falis antaŭ la urbo Mortain. La kornoj de lia frunto kaj la ungegoj de liaj membroj eniris profunde en la rokon, kiu konservas poreterne la postsignojn de tiu satana falo.

Li reveliĝis lama kaj misforma, kia li restos ĝis la fino de la Tempo ; kaj vidante en la malproksimo la fatalan Monton, kiu staras kiel pinta roko antaŭ la subirante suno, li bone komprenis ke li ĉiam estos venkata en tiu malfavora luktado, kaj li foriris per treniĝantaj kruroj, sin direktante al malproksimaj regionoj, forlasante al la malamiko siajn kampojn, montetojn, valojn kaj paŝtejojn.

Jen kiel Sankta- Mikaelo, patrono de la normandoj, venkis la diablon.

Aliaj popoloj imagus alimaniera tian batalon.

el « LA NORMANDAJ RAKONTOJ »
de Guy de Maupassant
traduko de Roland Dupuis
kun afabla permeso de la tradukinto

---

(1) *En Normandio, « fari truon » t.e. en festeno trinki glaseton da brando por doni lokon en la stomako al la manĝaĵo, kiu sekvos.*

AKTIVADO EN GREZIJONO

Ĉu vi scias, ke vi povas fari FOTADON en la Esperantista Kulturdomo Grezijono ?

Dum pasinta Aŭgusto, kelkaj plenaĝuloj kaj kelkaj gejunuloj « malkovris » Fotadon.

Pri materialo : oni havas belegan laborejon (la « nigra ĉambro »), tre bone instalitan. Oni povas riveli 5 aŭ 8 filmojn samtempe, kaj 3 personoj povas grandigi fotojn samtempe, ĉar en la laborejo estas disponeblaj 3 grandigiloj.

Dum venonta Aŭgusto, de la 12a ĝis la 31a, vi povos tiamaniere labori, foti, fotadi : la persono, kiu interesiĝos pri foto, povos aĉeti en Grezijono filmon aŭ filmojn (nur blankajn/nigrajn) kaj skatoleton de blanka/nigra fotpapero. La laborejo nun ne ebligas fari kolorfotojn. En skatoleto, estos dek folioj da fotpapero.

Vi povos uzi tri specojn da fotaparatoj : la vian aŭ Rolleiflex SLX 6 × 6 cm aŭ Minolta SRT 101 24 × 36 mm. La respondeculo de la fotaktivado pruntedonos la du lastajn fotaparatojn al tiuj, kiuj deziros uzi ilin, kaj donos konsilojn pri la teknikaĵoj.

Filmo de 12 bildoj 6 × 6 cm Ilford FP4 aŭ HP5 kostos 5 FF,

Filmo de 36 bildoj 24 × 36 mm Ilford FP4 kostos 5 FF ;

Skatoleto de fotpapero (13 × 18 cm) kostos 10 FF ; tiu prezo entenas la kemiaĵojn por trakti la dek fotpaperojn.

La rivelado de la filmo kostos 5 FF.

Tiamaniere, vi povos mem foti viajn infanojn, geamikojn, amikinojn, florojn, k.t.p... kaj vi mem faros ĉiujn etapojn ĝis la finitaj bildoj. Vi ankaŭ povos pligrandigi viajn bonajn fotojn ĝis 30 × 40 cm.

Se iu deziras pli da informoj pri teknikaĵoj, li povas skribi al « Sinjoro Grela, 16, rue de la Colline, 4840, Welkenraedt, Belgujo ».

Se vi deziras sekvi la fotaktivadon dum la tria staĝo, bonvolu tion antaŭmencii, kiam vi aliĝas.

DANKON.

SCIENCFIKCIO (fino)

Kiel oni povis konstati el la tri cititaj ekzemploj, estas sufiĉe granda varieco en la temoj de SF. Tamen komuna trajto estas trovebla ; oni povas ĝin jene formuli : se ekzistas certa tekniko aŭ teknikaro, tiel mekanikfizika, kiel psikologia aŭ sociologia, kiel ĝi povas efiki en certa ekzistanta socio, aŭ kiu sociformo plej bone korespondas al ĝi ? Oni rimarku ankaŭ, ke la evoluo de SF kondukis al ĉiam pli sinteza kompreno, kaj ofte la aŭtoroj citas unu la alian. Unu ofta ekzemplo estas la interstela vojaĝo ; laŭ la teorio de relativeco de Einstein, kiu en la nuna stato de fiziko povas esti konsiderata tute certa, oni ne povas vojaĝi pli rapide ol la lumo, tio estas po 300 000 km en sekundo ; krome la tempo ne fluas same rapide por restanto kaj vojaĝanto. Oni do povas imagi, kiel faris Langevin, ke vojaĝanto iras al stelo dudek lumjarojn for de ni, kaj revenas.

Tiu iro kaj reveno daŭras, por li, diru dek jarojn jes dek, tio ne kontraŭdiras la principon, ke oni ne vojaĝas pli rapide ol la lumo sed por la restantoj sur la Tero, tiu vojaĝo daŭras ekzemple okdek jarojn : la vojaĝinto trovas, ke liaj nepoj pli aĝas ol li mem. Nu, tre malmultaj aŭtoroj provis kalkuli kun tiu fenomenco. Oni povas citi la francan G. Klein, en l'Echiquier du Temps (la tempoŝaktabulo). En tiu romano estas imagata imperio etendiĝanta sur pluraj stelsistemoj, kaj la organizo ebliganta ĝian funkciadon malgraŭ la striktaj limigoj de relativeco (longaj vojaĝoj, malrapida interŝanĝo de mesaĝoj, ne samrapida maljuniĝo de la homoj). Tamen ĝenerale, la konstruo de romano, kiu akceptas la limigojn de relativeco, estas tre malfacila, des pli, ke la temo propra de la romano trudas ĝenerale aliajn postulojn.

Tial, iu enkondukis la ideon, ke ekzistas, krom nia spactempo, tiel nomata hiperspaco, tra kiu oni povas en momenteto kunligi tre forajn punktojn de nia spaco, tute sen la limigoj de relativeco. Tiu ideo montriĝis tiel oportuna, ke ĝi aperas en tre multaj romanoj, kie okazas spacvojaĝoj.

Tamen interstelaj vojaĝoj ne okazas nepre en ĉiu SF romano aŭ novelo, kaj multaj el ili okazas tute sur la Tero. Ekzemple City, de Clifford Simak, rakontas la estontecon de la Tero, la malaperon de la homaro kaj ĝian anstataŭigon far la hundoj, iĝintaj homnivele inteligentaj. Ankaŭ Slan, de van Vogt, okazas preskaŭ tute sur la Tero, kun nura vojaĝeto al Marso.

Se spacvojaĝo estas ofta temo aŭ ingredienco de SF, ĝi ja ne estas la sola, kaj almenaŭ du aliaj temoj estas ofte renkontataj kaj pritraktataj. La unua el tiuj estas la preternormalaj kapabloj de certaj homoj. Ili estas tre diversaj. Unu el ili estas telekinezio, tio estas la kapablo novi materion, eĉ sin mem, per la nura forto de l'penso.

La heroo de ne A, Gosseyn, malkovras, ke tiun kapablon li posedas kaj dum parto de la romano ekzercas ĝin, unue tre malfacile, poste pli kaj pli facile, ĝis li atingas la plenan kapablon movi sin de planedo al alia sen spacŝipo, kio estas treege praktika, ĉefe se oni ne povas pagi la bileton. Dua ebleco estas telepatio, tio estas la kapablo legi la pensojn de aliaj personoj kaj sendi siajn sen parolo aŭ materia rimedo. Rimarku, ke temas ĉi tie pri centprocenta efikeco, kio ne ekzistas nun, se telepatio entute ekzistas. La apero de telepatio kaj ĝia ĝeneraligo al ĉiuj homoj estas la temo de Mutacio, de Sturgeon. La tria ebleco estas antaŭdivenado. En la romano Dune, la planedo produktas ian spicon, nomatan miksaĵo, kiu ebligas antaŭvidi la estontecon. La navigistoj ĝin uzas por antaŭvidi la malfacilajn momentojn kaj elekti solvojn.

La lasta grava temo estas la tempovojaĝo. La pratipon skizis H.G. Wells en la Tempomaŝino. La romano de Wells montras la temon en primitiva formo, tio estas, la tempovojaĝanto estas nura observanto de la estonteco. Sed baldaŭ oni imagis la eblecon modifi la historion, kaj la temo pliriĉiĝis per la ebleco de paradoksoj, kies elementa formo estas jena : se mi estas tempovojaĝanto, mi povas reiri en la pasintecon kaj ekzemple renkonti mian patron antaŭ ol li renkontis mian patrinon aŭ gravedigis ŝin je mi. Se mi tiam mortigas lin, mi do ne povis esti koncipita, sekve mi ne ekzistas, do mi ne mortigis mian patron antaŭ ol esti koncipita, do mi naskiĝis, do ktp... Same kiel en ŝakludo elementaj ŝakmatfiguroj povas aperi kiel rezulto de tre komplikaj manovroj kaj kaŝitaj kaptiloj, same la tempoparadoksoj povas esti prezentataj en tre subtila maniero, kian frandas la amantoj de SF. Modela ĉirilate estas la romano de Asimov, la fino de Eterno.

En certa momento sur la Tero aperas (estas malkovrita) tempovojaĝo, kaj konstruiĝas komerca kompanio, firmo (la Eterno) por ĝin komerce ekspluati. La agado de tiu kompanio etendiĝas sur tridek jarcentoj ; kvindekjarcentojn poste oni trovas, ke kontakto kun ekstero iĝas (is, os ĉar tempovojaĝo kaj gramatiko malbone agordiĝas) neebla : tiujn oni nomas la fermitaj jarcentoj. Tiu firmo ne nur prizorgas komercon inter jarcentoj, sed ĝi intervenas en la historio por malhelpi evoluojn, kiujn ĝi juĝas malbonaj (oni nomas tion ŝanĝo de realeco ; la priskribo de la malaperinta ebleco estas en la arkivoj de la Eterno).

Tiel, ekzemple, la Eterno plufoje intervenis por malhelpi kreon kaj malvolviĝon de spacvojaĝo, kio kreus konkurencon. La krizo okazas, kiam teknikisto de la Eterno, pro kialoj kiujn mi ne volas rakonti ĉitie, provas detrui la Eternon simple malhelpante ĝian ekeston (jen la baza paradokso). Dum pluraj ĉapitroj sin sekvas harstarigaj diskutoj pri tiu paradokso kaj la manieroj ĝin refuti.

La diversaj temoj kuniĝas en pluraj verkoj ; plej fama estas « Time and again » (mi ne provas traduki tion) de Clifford Simak, kie estas spacvojaĝo, robotoj kaj androidoj, preternormalaj kapabloj kaj tempovojaĝo, kune kun amromano, ĉar tamen temas ankaŭ pri homoj.

Konkludo

Sciencfikcio estas literatura formo, kun propraj reguloj, frukto de la moderna mondo. Same kiel tiu ĉi, ĝi evoluas. La teknika progreso, iam konsiderata, kiel helponta la homaron por solvi ĉiujn ĝiajn problemojn, estas nun malpli konfide rigardata. Tio respeguliĝas en la plej moderna SF, kie polucio, loĝdenseco, kulturdiferencoj, ktp, ludas gravan rolon. Oni povas konsideri, ke SF estas portreto, fantazia sed simileca, de nia mondo, en kiu la aŭtoroj uzas la eblecojn de senlimaj kapabloj por pritrakti en pli-malpli plaĉa formo politikajn, filozofiajn, ktp, problemojn kaj ideojn.

Mi ne volas fini ĉi tiun artikolon sen mencio de la en Esperanto ekzistanta SF literaturo. Ĝi bedaŭrinde estas malampleksa. Tradukiĝis

— de E.R. Burroughs : Princino de Marso (trad. K.R.C. Sturmer),
— de H.G. Wells : la Tempomaŝino (trad. E.W. Amos), kaj kelkaj aliaj.

Originalaj verkoj estas :

— de Sandor Szathmari : Vojaĝo al Kazohinio.

En maniero tute malsimila je tiu de la usonaj aŭtoroj, ĝi estas tre pensiga verko, kvankam en foje malglata stilo.

— de Szathmari ankaŭ : Maŝinmondo : novelaro.
— de Konisi gaku : Vage tra la Dimensioj : novelaro, kaj kelkaj aliaj. Ĉi-tiu listo ne pretendas esti kompleta. Tamen pliampleksigo de la internacilingva SF literaturo ŝajnas al mi necesa.

Vilem.

Klarigoj :

Androido : biologia roboto, homsimila.
Kromnoto : la Esperantistoj verŝajne scivolas, ĉu lingvaj problemoj ludas ian rolon en SF. La respondo estas kompreneble, ke ili ludas nenian aŭ malgrandan rolon, ĉar alie rapida disvolviĝo de la intrigo estus preskaŭ neebla. Tial, priatento de lingvaj problemoj estas tre malofta. Mi citu denove la romanon Dune pri tio.

FERENC MORA

LA CIKONIO DE MONTPELLIER (*)

Se diri sincere, pri la cikonio de Montpellier mi nur tion scias, ke ĝi ekzistas kaj mi povas danki mian etan scion pri ĝi al la logiko. Dum mia vizito en Montpellier, mi vidis terure grandajn barilojn surstrate kaj ĉirkaŭ ili multe da infanoj ludis-saltadis. Nu, el tio mi konkludis, ke ankaŭ tie devas esti cikonio, ĉar tiujn infanojn iu devis nepre tien alporti.

El la enkondukaj vortoj ĉi leganto povas rimarki, ke nun sekvos historieto, kiun aperigi kiel edifan legaĵon por la adoleskanta junularo, ne estas konsilinde. Ĉi-okaze vere « la muroj aŭdas », do, oni elsendu la geknabojn el la ĉambro dum la rakonto por glaso da akvo. La pliaĝuloj trankvile aŭskultu min. Nu, ili povos unue ekscii, ke la servo de la ĝenerala intereso estas pli grava ol ĉio alia kaj kion ĝi ordonas, tio devas esti farenda, ĉu ĝi plaĉas, ĉu ĝi ne plaĉas. Due, oni ne povas eĉ deziri pli moralan cikoni-historieton ol la sekvonta. Alimaniere neniel estus notinta ĝin en Ramon Muntaner, la nobela kataluna kronikisto, kiun la hispana historiografio estimas kiel fonton, same kiel la hungaraj historiistoj estimas magistron Johano Köküllei.

Ĉirkaŭe la kronikistoj estis samtempuloj, nur la hispano ne estis magistro, sed « don ». Krome li foruzis ne nur la plumingojn, sed en la bataloj li dehakadis la kapojn de la paganaj maŭroj kiel fidela kapitano de sia reĝa moŝto, En Jacme, kiun la hispanaj lernejanoj konas kiel Konkerantan Jakobon, kiam ili respondas al la instruisto dum la historia leciono, se nur hazarde ili ne estas okupataj pri revolucio.

Nu, ĝuste ĉi tiun Konkerantan Jakobon alportis la cikonio de Montpellier por la hispana historio.

La patro de En Jacme estis En Pere — tiel diriĝas katalune Don Pedro, — reĝo de Aragonio, grafo de Urgel kaj princo de Montpellier. Kvankam ankaŭ tiutempe Montpellier troviĝis maltrans la Pireneoj, sed la maljuna princo Guillaume donace donis ĝin al la reĝo de Aragonio kune kun sia filino. Verdire ĉi tio estis iome misedziĝo, kvankam la bofilo estis reĝo, sed la filino estis nur princino ; jes, sed la prauloj de la reĝo estis nur paŝtistoj de bovoj, kontraŭe Maria de Montpellier estis la nepino de la imperiestroj de Bizanco. La maljuna princo estante demokrato, la malmulton li preterigardis, tiel kalkulis, ke iam ankaŭ lia nepo povos fariĝi bizanca imperiestro, se la bofilo lerte klopodos.

Sed la maljuna princo ne havis tempon ĝisatendi la nepon, kvankam En Pere lerte penadis-klopodis, sed ne tie, kie li estus devinta. Ĉi tiu grandsinjoro havis grandegajn okulojn, en kiuj ĉiuj virinoj havis lokon, kiujn li ekvidis, escepte sian edzinon. Dum la bopatro vivis, li fojefoje vizitis sian edzinon en Montpellier, sed li neniam havis tempon trafi en pli intiman rilaton kun ŝi. Li ĉiam havis gravan interkonsiliĝon sekvonttage kaj tiun mallongan tempon pasigitan kun la edzino li malŝparis per politikaj babiladoj.

— Nu, mia kara — li klarigis senesperiĝinte, — la « hidalgoj » de Barcelono ne estas tiel ŝafmildaj kiel la butikistoj de Montpellier. Sangavidaj ursoj estas miaj nobeluloj kaj ili tuj disŝiras min, se mi ne estas kun ili.

Kiam post la bona, maljuna princo fermiĝis la pordo de la kripto, la reĝa moŝto neniam plu iris hejmen por manĝi eĉ teleron da supo. Dum vintro ne eblis trapasi la montojn pro la neĝo, kiam printempiĝis, la riveretoj altiĝis ; kiam la maŭroj pace vivis, tiam li devis rebati kastilan atakon kaj en la milita ĉefkomandejo tia trablovo trafis la reĝon, ke dum monatoj li eĉ moveti sian talion ne povis pro la podagro.

— Mia animo, mia sinjoro — sendis sciigon Maria de Montpellier, — ĝuste nun estas tre bezonataj la flegantaj, karesantaj manoj de la edzino.

En Pere la saman tagon resendis la kurieron.

— Kun nia omaĝo transdonu al nia reĝino nian ordonon, ke ŝi ne forlasu sian pacan urbon. Ĉi tie regas konstante malfacilaj cirkonstancoj kaj ŝia alta persono ne estus en sekureco. Raportu al ŝi humile, ke vi vidis nian reĝan buŝon tre murdita, el kio ŝi povos kompreni, en kia granda ĉagreno ni troviĝas inter la nobeloj kaj altmoŝtuloj.

La juna reĝino tre bone sciis inter kiaspecaj nobeluloj kaj altmoŝtuloj devas batali la reĝa moŝto senhalte kontraŭ la gravaj malfacilaĵoj. La tuta mondo sciis, ke la reĝo de Aragonio ĉiunokte dibocas kune kun siaj regatoj kaj nur tiam li demetas la pokalon, kiam tri frapetoj aŭdiĝas sur la pordo de la dormoĉambro.

— Sinjoraj moŝtoj, la beno de Sankta Johano — diras tiam la reĝo kaj ĉiuj regatoj iras kun la pokaloj en la banĉambron kaj elĉerpadas el la marmorbaseno la ambre parfumitan malvarmetan akvon, el kiu antaŭ nelonge elpaŝis la amatino de la reĝo.

Tiutempe la manifestado de subula omaĝo havis ankaŭ pli malagrablan formon ol ĉi tio.

Voje-vojrande rondiris tiu klaĉo, ke la reĝo havis feŭdulon, kies stomako ne volis toleri la ambran akvon. Li nomiĝis En Garcia, kiu estis perfekta kavaliro, ankaŭ granda estimanto de la ina gento, sed kiam alvenis la adiaŭo por trinki la lastan pokalon, li terenĵetis ĝin.

— Kion vi aŭdacis, vi ribelulo ? — ekkaptis la reĝo sian glavon.

(*) **Por kompreni la titolon, jen la klarigo : en Hungario oni diras al la malgrandaj knaboj kaj knabinoj, ke la infano tiel naskigas, ke la cikonio portas lin aŭ ŝin al la panjo.**

— Trankviliĝu mia reĝa moŝto — ridetis flegme la kortegano. — Tial mi ne gustumas la supon, ĉar eble mi ekdezirus ankaŭ la viandon.

En Pere ekridetis kaj de tiam En Garcia fariĝis lia plej konfidenca kortegano. Ĉiam li ŝlosis la reĝan dormoĉambron kaj postene staris antaŭ la pordo ĝis mateno.

Foje ĉi tiun En Garcia vizitis la sinjoroj konsilanoj de Montpellier. /La konsuloj kiel la kronikisto nomas ilin./ Ili rakontis pri la ilin premantaj pezaj zorgoj, ke Maria de Montpellier ne estas reĝedzino, nur reĝino.

— Ŝia zorgo ; kial tio afliktas vin ? — ridis la ĉefpordgardisto.

— Ne estas tiel simpla la afero — respondis la delegitoj. — Ni reprezentas la ĝeneralan intereson. Kio okazos pri nia lando, se la reĝa moŝto mortus sen ido ? Ĉu la lupoj de la potenco disputu pri ni kaj dividu nin inter si ? La ŝtatintereso postulas, ke ni havu laŭleĝan tronheredanton.

En Garcia estis ne nur brava kavaliro, sed ankaŭ saĝa ŝtatisto. Li komprenis, ke la ĝenerala intereso devas esti plenumata. Sed kiel komenci ? Antaŭ ĉio la reĝo devos iele iri en Montpellier.

— Tio estas la plej facila — diris la kortegano. — Konstruu al via reĝa moŝto novan kastelon kaj mi promesas al vi, ke mi igos lin partopreni en la inaŭguro de la kastelo ; la cetero estos jam la zorgo de la reĝino.

Neniam konstruiĝis ankoraŭ reĝa palaco tiel rapide. En Garcia tenis sian vorton, eĉ li faris pli. Li kunportis ne nur la reĝon en Montpellier, sed ankaŭ donna-n Izabela, al kiu En Pere estis plu freneze enamiĝinta ol antaŭe al kiu ajn el siaj amatinoj. Pro tio fiaskis la bona intenco de la subuloj. Kion ajn elprovis la kuracistoj de Montpellier, nenia amsorĉado efikis al la reĝo. Se oni miksis la pulvoron de mandragoro en lian trinkaĵon, li trinkis ĝin ; se oni bakis tri harojn de reĝino en lian kukon, li manĝis ĝin, sed lia koro restis sensenta. La reĝo kiel la unua kavaliro de la lando, kiel decis, de mateno ĝis vespero traktis delikate donna-n Maria ; ŝi sidis ĉe lia dekstra flanko ĉe la kavaliraj konkuroj, ĉe la florkonkuroj li igis ŝin ĉiam venki, dum la festenoj li omaĝis per madrigaloj al ŝi, sed post la vespermanĝo li venigis ĉiam donna-n Izabela antaŭ ol En Garcia estus ŝlosinta la pordon.

— Nu — diris foje la konsuloj de Montpellier al sinjoro Garcia — kio okazus, se foje iun nokton anstataŭ donna Izabela vi enŝlosus donna-n Maria kun nia reĝa moŝto.

— Hum — karesis sian mentonon la kortegano — mi pensas, ke por ŝtatintereso tio povos estis farita. Jen la demando, kiel opinios pri tio donna Maria.

Donna Maria opinias jene, — mi citas laŭvorte la kronikon :

— La tuta mondo sciis, ke en Montpellier troviĝas la plej saĝaj konsilianoj, nun ankaŭ mi asertas tion. Mi adoptas vian opinion, se nur ankaŭ Dio donus sian benon pri ĝi.

— Ankaŭ tion ni akiros — kapbalancis la sinjoroj konsilianoj kaj pritraktante la aferon kun la eklezianoj, estis ordonite, ke la kreduloj faru penitencon dum unu semajno, ili fastu, kantu psalmojn petante Dion ŝanĝi la malbonon en bonon.

Kiam fine forpasis la semajno kaj alvenis la dimanĉa vespero, En Garcia kiel ĉeforganizanto ĵetis sin al laboro. Li kondukis la grandsinjoron en la dormoĉambron, estingis la kandelojn dezirante trankvilan, bonan nokton kaj — kiel alifoje liakutime — por iom da tempo li lasis la pordon malfermita post si. Sed nun mi devas denove laŭvorte citi la kronikiston por ke nenio perdiĝu el la naiva ĉarmo de la mezepoka riporto :

— Kaj kiam ĉio silentiĝis, tiam enpaŝis la antaŭcambron dudek kvar konsilianoj, la abatoj, la prioroj kaj dekdu nobelaj virinoj kaj fraŭlinoj, ĉiuj kun kandeloj en la manoj, ankaŭ du ĵurintaj tribunalaj skribistoj. Post kiam ĉiuj loksidiĝis, envenis la reĝino kaj iris al sia edzo ; kiuj restis ekstere, metis sin sur la genuojn kaj komenci fervore preĝadi. Kaj la reĝo kaj la reĝino amuziĝis unu kun la alia, ĉar la reĝa moŝto kredis esti kun tiu damo, kiun li tre amis. Kaj la tutan nokton estis malfermataj ĉiuj preĝejoj kaj la tuta popolo petis nian Sinjoron, nian Dion kaj nian Sanktan Virgulinon, nian Dipatrinon Maria, ke por la ĝojo de la tuta mondo estu sanktigita ĉi tiu nokto.

Kiam ekmateniĝis, En Garcia kaj la sinjoroj konsilianoj, la abatoj, la prioroj, la nobelaj damoj kaj fraŭlinoj kun kandeloj, en la manoj, ankaŭ la du ĵurintaj tribunalaj skribistoj kun la farita protokolo, enpaŝis la dormoĉambron, kies pordon sinjoro Garcia plene malfermis.

— Kion vi volas ? — timvekiĝis la reĝo pro la bruo kaj kaptis la glavon apogitan kontraŭ la ekstremo de sia lito.

La tuta ĉeestantaro surgenuiĝis kaj kun levitaj manoj kriis :

— Indulgon, pardonon nia reĝa moŝto, rigardu, kiu estas apud vi !

Tiam la reĝino sidleviĝis, ke la reĝo povis ŝin rekoni kaj li konsternite demandis :

— Sed kiel povis ĉi tio okazi ?

La Montpellier-anoj faris pentoplenan konfeson kaj — kiel la kronikisto finis la rakonton, — la pia reĝo ekridetis dirante :

— Se jam ĉi tiel okazis, Dio plenumu vian deziron ! Li plenumis ĝin. Maria de Montpellier naskis la tronheredanton, En Jacme, kiu estas konata en la hispana historio kiel Konkeranta Jakobo kaj kiu edzinigis la hungaran reĝidinon Violanta, la filinon de nia reĝo, Endre la dua.

El hungara :

D-ro Istvan Nagy.

POR VIA DISTRO

Solvoj de la antaŭaj problemoj

La Kvadratoj

1)	2)	3)
kapro	frato	sobra
karpo	farto	sabro
korpa	forta	borsa
porka	trafo	boras
parko	torfa	rabos




Unuaj frazoj..., titoloj..., aŭtoroj...

1) LORKAJ : Transe.
2) BAGHY : Viktimoj.
3) AULD : La Infana Raso.
4) SZATHAMARI : Maŝinmondo.
5) OTĈENAŜEK : Romeo, Julieta kaj la Tenebro.
6) PRIVAT : Vivo de Zamenhof.
7) FORGE : Saltego Trans Jarmiloj.
8) ENGHOLM : Infanoj en Torento.
9) VALANO : Ĉu vi kuiras ĉine ?
10) ORZESKO : Marta.
11) BOULTON : Okuloj.
12) ZWEIG : Brulanta Sekreto.
13) SCHWARTZ : :Kiel Akvo de l'rivero.
14) SZILAGYI : La granda Aventuro.

NOVA PROBLEMO

ANAGRAMVORTOJ (proponitaj de S. Bourot)



La anagramvortoj estas krucvortoj, kies difinoj estas anstataŭitaj de senordaj literoj. Sed neniu indiko estas donita pri la vortoj entenantaj malpli ol kvar literoj.

Per tiuj literoj, necesas plenigi la tutan kradon, horizontale kaj vertikale.

Horizontale.

1) AEIIOŬJKRST.
2) AIOOODMNNŜT.
3) AIIODĜS.
4) AURTT (sen finaĵo).
5) EIUN.
6) AAIKŜT.
7) EOOOBNT.
8) UFST (sen finaĵo).
9) EIORT.
10) IOOONRT.

Vertikale.

1) EEIIOKSSTTT.
2) OOUUDKKNNRŜ.
3) AEOORSTT.
4) AIMR. - AOBN.
5) EOCR.
6) EIOUCŜTT.
7) IIOL. - A IMNNS (sen finaĵo).
8) AUKRT.
9) EIOB. - OOJT.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PREZENCO

Difino (PIV) : Verbo-tempo, esprimanta, ke la ago aŭ stato okazas en la estanteco : perfekta, imperfekta, predikta prezenco.

AS

Finajo de la indikativa aktiva prezenco, esprimanta, ke la ago, jam komenciĝinta, ankoraŭ ne finiĝis :

— la patro skribas leteron kaj la infanoj preparas siajn lecionojn.

RIMARKO (PIV)

Ĉar tempo estanta ekzistas vere nur kiam la ago aŭ stato daŭras sufiĉe, tial la prezenca sufikso esprimas ankaŭ agon aŭ staton konstantan aŭ ĉiamvaloran :

— en tiu lando loĝas tri milionoj da kristanoj ;


— ses dek minutoj faras unu horon.



Ŝanĝema virino

— Mia kara, mi rimarkigas al vi, ke hejme vi regule dietas por resti svelta. Tamen ankaŭ en la restoracio, la aliaj virinoj tre malmulte manĝas por ne dikiĝi...

— Sed karulo, vi ĉiam diris al mi, ke vi elektis min, ĉar mi tute ne similas la aliajn virinojn !





Ha ! la klientinoj !

Tri kilogramoj kaj duono ! Kion tio signifas ? estu pli preciza ! ĉu kunoste aŭ senoste ?



Fantazia Naturo

Mia horoskopo ne mensogis ; ĝi diris al mi : « Vi direktiĝas al malfacile solvebla problemo ». Kaj nun ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (240 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44133 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (40 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 5 de 1978, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Après le temps habituel de réflexion, la machine s'est remise en route. Les demandes de renseignements arrivent et nous avons déjà un certain nombre d'inscriptions fermes pour le printemps et pour l'été.

Les nombreuses discussions qui ont eu lieu lors de la dernière réunion du Conseil d'administration ont été intéressantes. Elles ont montré un désir de sortir de certaines ornières. En particulier, de faire participer les stagiaires à la vie de la Maison Culturelle. Nos responsables remarquent qu'un nombre non négligeable d'espérantistes présents pendant l'été ont tendance à considérer Grésillon comme un hôtel, se tiennent un peu à l'écart de la vie du groupe et ont les exigences que peut avoir un client vis-à-vis du « patron » de l'hôtel ou du restaurant. Il faudra donc non seulement bien faire sentir ce qu'est réellement Grésillon, mais aussi rechercher et coordonner les bonnes volontés qui pourront contribuer, en particulier, à l'activité du groupe tout entier (soirées, animation pendant la journée). L'animation peut toucher un nombre restreint de personnes, cela n'a pas d'importance. L'essentiel serait que les « ateliers » soient suffisamment nombreux pour que chacun trouve une occasion d'apprendre ou de pratiquer quelque chose qui lui plaît. L'activité de ces ateliers peut concerner des échanges de haut niveau, une activité artistique, ou tout simplement une activité manuelle réputée « terre à terre ». L'essentiel est que le plus grand nombre trouve un sujet d'intérêt, même limité dans le temps, et l'occasion d'une rencontre avec d'autres par l'espéranto.

P. BABIN.

INTER NI

Multaj interesaj diskutoj okazis dum la lasta kunveno de la Konsilio. Unu el ili, kiu montris deziron eviti falon en rutinon, temis pri la aktiva partopreno de la ĉeestantoj en la komuna vivo. Kelkaj fakte tendencas konsideri Grésillon kiel ordinaran hotelon kaj postulas kvazaŭ ili parolus al hotelestroj aŭ restoraciestroj. Estos necese tuj precizigi la specifecon de Grésillon. Ankaŭ necesos kuraĝigi ĉiun alporti ion al la aliaj, ion eĉ etan. Estas dezirinde, ke la nombro de aktivadoj aŭ aktivadetoj estos sufiĉe granda por ke ĉiu ĉeestanto havu okazon trovi interesaĵon ricevotan aŭ donotan. Oni aktivu sur alta ŝtupo aŭ zorgu, eĉ dum mallonga tempo, pri io dirita « materia », ne gravos, kondiĉe ke tiuj kontaktoj estos okazoj de interŝanĝoj en Esperanto.

P. BABIN.

LA REVUE

L'abonnement annuel de **Kulturaj Kajeroj** a donc été porté à 40,00 francs. Nous avons expliqué dans le précédent numéro pourquoi nous en avons été amenés là. Il ne semble pas que cette augmentation décourage les abonnés. Il est évident que les retardataires de 1978 paient l'ancien tarif.

Il n'y a plus donc maintenant qu'un seul tarif. Il est cependant souhaitable que tous ceux qui le peuvent fassent un geste supplémentaire. Mais il a été décidé que les noms des bienfaiteurs éventuels ne paraîtront plus sur la revue.

NOS PEINES

Notre ami Robert Martin, inspecteur régional d'anglais, dont l'activité a permis la naissance du groupe espérantistes de Rennes, est décédé en octobre. L'Esperanto perd un ardent et éminent propagandiste.

●

Nous avons appris, avec beaucoup de peine, le décès de M. Jean Philippeau, un ami de Grésillon depuis les premiers jours. Que Mme Philippeau et ses enfants trouvent ici l'expression de toute notre sympathie.

Pour l'achat d'un photocopieur

Des amis, ayant constaté l'été dernier qu'un appareil photocopieur serait très utile à Grésillon, nous ont écrit pour proposer qu'un fonds spécial soit ouvert. Ils ont joint une somme de 100 dollars.

Si vous pensez pouvoir inscrire votre nom sur la liste, faites vos versements à : Maison Culturelle Espérantiste, par chèque bancaire ou par virement postal au compte Nantes 1485 39 P.

Merci à tous.

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon - 49150 BAUGE

C.C.P. Nantes 1485 39 P
Téléphone :
- pendant les stages : **(41) 89-10-34**
- hors des stages : **(40) 76-77-95**

Programme 1979

PRINTEMPS :
Arrivée le **Mercredi 11 Avril,** après-midi.
Départ le **Mercredi 18 Avril,** au matin.
— Rencontre d'enfants (accompagnés).
— Pédagogie pratique.

CONFERENCES

du lundi 2 juillet au samedi 21 juillet

— Trois cycles de conférences.
— Discussions.
— Etude et pratique de la langue.
— Atelier de théâtre.
— Excursions.

COURS

du lundi 23 juillet au samedi 11 août

— Cours pour débutants (méthode active - directe).
— Pratique de la langue en groupes.
— Ateliers divers (traduction, étude d'une œuvre, grammaire, théâtre, etc...).
— Excursions.
— Travaux manuels.

ACTIVITES MANUELLES ET ARTISTIQUES

du lundi 13 août au samedi 1er septembre

— Photographie (prise de vue, développement, montage, etc...).
— Danses folkloriques.
— Activités manuelles.
— Etude et pratique de la langue.
— Excursions.

N.B. — Toutes les arrivées, même celles des personnes qui ne désirent pas rester pendant une période entière, auront lieu un lundi, et les départs un samedi.
— Des sessions d'examens auront lieu. Mais les cours donnés à Grésillon ne préparent pas spécialement à ces examens. Sauf pour les débutants, ils n'ont pour but que de parfaire et préciser des connaissances antérieures.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	15,00
Pendentifs	:	15,00
Pendentifs grosse étoile	:	25,00
Coupe-papier	:	25,00
Disques de stationnement	:	5,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	3,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

ALBERTO FERNANDEZ

SENĜENAJ DIALOGOJ

Popularscienca esploro de

Fundamentaj demandoj